

FRANCA KATOLIKA



ESPERANTISTO

N° 193 JUNIO 1997

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO.

*** *Sankta* **PIO X-a**, *preĝu por ni.* ***



Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
La basilique de Thierenbach <i>Baziliko de Thierenbach</i>	6
Emission radio - <i>Radio elsendoj</i>	8
<i>Intervjuo ĉe Pola Radio</i>	9
Dans notre association - <i>En nia asocio</i>	11
<i>Utilaj informoj</i>	12
Calendrier - <i>Kalendaro</i>	14
50ème Congrès International à Rome-Rimini <i>50-a Internacia Kongreso en Romo-Rimini</i>	15
Anecdotes- <i>Anekdotoj</i>	17
Annonces - <i>Anoncoj</i>	18
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	19

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/ Ass. Cath. Française pour l'espéranto
Sendinto 9, Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- Adresse insuffisante
- N'habite pas à l'adresse
- Refusé
- Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

La Baziliko de Thierenbach, kiu situas en Alzaco, en valo inter Mulhouse kaj Colmar (Haut-Rhin).

La pilgrimantoj venas dum la tuta jaro al tiu Pilgrimo de Nia Dipatrino de la Espero ("Pelerinage de Notre-Dame de l'Espérance"). Inter la 300.000 pilgrimantoj, de jardekoj venas ankaŭ regule la alzacaj italoj, poloj, ukrainoj, ...ĉu iam ankaŭ esperantistoj? La Festo de la Dipatrino de l'Espero estas la lasta dimanĉo de majo de ĉiuj jaroj.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 10.a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 193 Junio 1997

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

F-ino A M CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto:

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de la Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto:

P-ro L. BOURDON
7, Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU
95, Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio:

Fam. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Rete 100623,3022@Compuserve.com

Le Mot du Président

Tous les espérantistes ont le souci de répandre, diffuser et enseigner la langue internationale. C'est un impératif pour nous tous et c'est grâce aux efforts que nous fournissons sans cesse que, depuis sa création en 1887, l'espéranto a prospéré et s'est imposé. Il est en effet la seule langue planifiée qui ait réussi à sortir du stade expérimental et à devenir une réalité, que ne sauraient nier les gens de bonne foi.

Mais cette réussite et cet aspect des choses ne doivent pas nous faire oublier qu'une autre tâche, toute aussi importante et nécessaire, s'impose à l'ensemble du mouvement et des associations espérantistes, celle de conserver la mémoire de nos activités, des hommes qui les ont entreprises, bref de veiller à accomplir, lorsque cela est possible, oeuvre d'archivistes et d'historiens.

Il existe heureusement des lieux où chercheurs et spécialistes peuvent se rendre pour étudier la genèse et le développement du mouvement espérantiste. Ce sont les musées consacrés à notre langue. Nous connaissons tous celui de Vienne, section de la Bibliothèque Nationale autrichienne, qui existe depuis plus de 70 ans et fait notre fierté.

Mais en France nous possédons également un musée similaire, celui mis en place par la municipalité de Gray (Haute Saône). Il est de notre devoir de soutenir activement cette fondation, qui est une véritable vitrine de notre mouvement et un centre de documentation pour tous ceux qui désirent s'informer sur l'espéranto. Le Musée possède une salle spécialement dédiée à l'usage de l'espéranto dans les milieux religieux. Notre bulletin y figure en bonne place; nous nous devons d'apporter notre appui et notre intérêt à ce Musée qui vient, tout récemment de fêter ses 20 ans d'existence.,

La Bileto de la Prezidanto

Ĉiuj esperantistoj dediĉas sian atenton al la disvastigo, disdonado kaj instruado de la internacia lingvo. Tio estas devo por ni ĉiuj; dank'al la klopodoj, kiujn ni senĉese faras, esperanto, de post sia kreado en 1887, ne ĉesis prosperi kaj trudiĝi. Ĝi ja estas la sola planita lingvo, kiu sukcesis eliri el la eksperimenta stadio kaj fariĝi realaĵo, kion ne povas nei sinceraj homoj.

Sed tiu sukceso kaj aspekto ne devas forgesigi, ke alia tasko tiel grava kaj necesa, sin trudas al la tuta movado kaj E-asocioj konservi la memoron de niaj agoj, de niaj homoj, kiuj eklaboris, resume prifari, kiam eblas, laboron de arkiviantoj kaj historianoj.

Feliĉe staras lokoj, kie esplorantoj kaj specialistoj povas iri por studi la genezon kaj disvolviĝon de la E-movado. Tiuj lokoj estas la muzeoj dediĉitaj al nia lingvo.

Ni ĉiuj konas tiun en Vieno (sekcio de la Nacia Aŭstria Biblioteko) kiu ekzistas pli ol 70 jaroj kaj estas nia fiero.

Sed same en Francio ni havas similan muzeon, tiun starigitan en la urbo Gray (Haute-Saône). Estas nia devo forte subteni tiun instancon, kiu estas vera montrofenestro de nia movado kaj centro de dokumentado por kiu deziras informiĝi pri esperanto. La Muzeo enhavas salonon tutspeciala dediĉitan al la uzo de esperanto en la religiaj medioj. Nia bulteno tie staras en bona ordo; ni havas la devon alporti nian apogon kaj intereson al tiu muzeo, kiu antaŭnelonge solenis sian 20-jaran starigon.

SERVADI ESTAS ĜOJO

Mi dormis kaj songis:

Vivo estas nur ĝojo.

Mi vekiĝis kaj vidis,

Ke vivo estas servado.

Mi servadis kaj komprenis,

Ke servado estas ĝojo.

Rabindranath Tagore

(trad: A.B)

LI VENU

Venu, vera Lumo

Venu, eterna Vivo

Venu, kaŝita Mistero.

Venu, sennoma trezoro

Venu, senkrepuska lumo

Venu, eterna ĝojo,

Espero, kiu deziras savi ĉiujn.

Venu, resurekto de la mortintoj, venu.

Venu, ho Vi,


Vi, kiu deziris, ke mi volu vin.

Vi, nepre nepenetrebla

Venu, impeto de mia vivo

Venu, konsolanto de mia koro.

Simeono la teologo, 11-a jc.



La Baziliko de Thierenbach

En nia XX.a finiĝanta jarcento, kiu konas la eljeton de tiom da fundamentaj valoroj, la forigon de la tradicioj, la kontestadon pri multaj institucioj, ĉu ne estas mirinde konstati la altiron, kiun ekzercas la pilgrimaj lokoj al la popolamaso ? Ilia kresko estas rimarkebla ! Ne nur la grandaj internaciaj spiritaj centroj altiras milionojn da pilgrimantoj jare (Lourdes, Fatima, Czestohowa ...), sed ankaŭ regionaj lokoj. Ci-sube ni prezentos regionan pilgriman lokon - la plej faman de la departamento " Haut-Rhin " (68) .

Kial oni retroviĝas en Thierenbach ? La facileco de la atingebleco estas grava sed la natura pejzaĝo estas mirinda bela, elvoka, alloga , ...

"Alpremite en la komenco de iu Vojeza valo kaj dorsapogite al la plej alta montaro de tiu regiono (Grand-Ballon),

Thierenbach akceptas vizitantojn en la agrablega verdaĵo de siaj herbejoj. La loko malfermiĝas kiel rifuĝejo por kvieteco kaj paco, vidalvide al la zumada alzaca ebena, la mineja baseno kaj la urbaro Mulhouse.

Estas ankaŭ la familiaj tradicioj, karaj al la alzaca popolo: " Ni edziniĝis ... " " Ĉi-tie , mi forte travivis la ĉeeston de miaj karaj gepatroj, kiuj en tiu benata preĝejo, konfidis al la Dipatrino, siajn ĝojojn kaj ĉagrenojn " - " Ni venis tien ĉiujare " ... Sed la motivoj kiuj kondukas al Thierenbach estas ĉefe religiaj. " Vi ne povas imagi kiel kviete kaj pace oni sin sentas en tiu serena kaj sankta loko " - " Oni preĝas tiel bone " .

Multaj samepokuloj sufokiĝas en nia anonima kaj materialista mondo. La pilgrimaj lokoj helpas renkonti

Dion , revivi kun espero. La homo daŭre ne povas kontentigi sin nur per " teraj nutraĵoj " . Poste li foriras transformita, pli libera, pli feliĉa por vivi kaj sin devontigi en la servo de siaj fratoj.



Mirakla statuo (Dipatrino de la sep doloroj), polikroma ligno de 1350, kronita la 22. an de julio 1935.

La jarmila pilgrim-loko estis fondita en 730 de la benediktanaj monaĥoj, kiuj venis el Irlando. En 1125 juna nobelo de Soultz, trafita de nekuracebla malsano, estis mirakle resanigita. Tiu junulo estis poste monaĥo en Cluny kaj fondis en Thierenbach la unuan romanikan preĝejon en 1130. Dum la Tridekjara Milito la preĝejo estis detruita. Ĝi estis rekonstruita en baroka stilo en 1723 de Peter Thumb de Bezau. En 1881 tiu preĝejo iĝis paroĥo de najbara vilaĝo Jungholtz . En 1935 la statuo de la "Pieta de Thierenbach " estis solene kronita de la franca apostola nuncio Mgr. Maglione . En 1936 Papo Pio XI. a aljugis al Thierenbach la titolon - duaranga baziliko.

La baziliko havis ankaŭ kripton por la entombigo de la monaĥoj.

Ĝi estas en la mezo de la navo. La supera etaĝo de la kriptoj enhavis la religiulojn, kaj la suba etaĝo gastis la sekularojn. Inter ili estas ankaŭ Dom Dorival, ĝenerala vikario de la Abatejo de Cluny kiu mortis tie en 1703.

Drama historio okazis al Dom Marloys kiu estis entombigita en la kriptoj en 1753. Kelkajn jarojn poste, kiam oni malfermis la tombokelon, oni retrovis lin, for de la ĉerko, vestitan per sia monaĥa vestaĵo, kaŭrantan sur la lastaj ŝtupoj de la kriptoj.

el : Asocio Amis du Pèlerinage Notre-Dame de Thierenbach
F-68500 GUEBWILLER . Tel:0389769566.

AŬSKULTU VATIKANAN RADION

Elsendoj en Esperanto :

DIMANĈE - Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (10')

Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)

Satelite : Eutelsat II-F1,13 E 10.987 GHz,transponder 25,

Video NBC S,subportanto 7.39 MHz FM,Panda 1,Vert.Polar.

MERKREDE : Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (14')

Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)

Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio
SCV-00120 CITTA del VATIKANO
<http://www.wrn.org/vatican-radio/>

POLA RADIO :Elsendoj en esperanto ĉiu-tage !

15h30 31,50m;41,18m;41,99m;50,00m(9525,7285,7145,6000kHz)

22h30 41,27m;49,71m;49,22m (7270,6035,6095 kHz)

Per satelito: Eutelsat II F-3-16 gr. orienta lat., 11.080 GHz H

Subportanto 7,38 MHz . Ĉiutage : 06h30 - 15h30 kaj 20h00

Pola Radio-Esperanto Redakcio PF 46 PL-00977 VARSOVIO

Lige kun la vizito de la papo Johano Paŭlo la II.a en Pollando la E-Redakcio de Pola Radio turnis sin al la aŭstultantoj kun la peto prezenti propran opinion pri la signifo de la pilgrimadoj de la papo. Venis respondoj el diversaj landoj, eĉ de homoj, kiuj ne centprocente samopiniis kun la papo, ekzemple pri la demando de aborto, respondoj de ateistoj kaj anoj de aliaj konfesioj. Inter la respondintoj estis ankaŭ prof. Lee Chong Young, la prezidanto de UEA, kiu skribis :

<< En la okuloj de la Dio, ĉiuj homoj, katolikoj aŭ ne-katolikoj, estas samaj . Li donas amon ankaŭ al ĉiuj homoj. Nura diferenco estas ke katolikoj scias ke ili ricevas la amon, kaj ne-katolikoj ne scias. En tia senco, "la vojo de la Eklezio devas celi ĉiujn homojn ". Ĉar ĉiuj homoj estas egalaj en la okuloj de Dio, ili havas samajn homajn rajtojn, sendepende de raso, haŭtkoloro, sekso, LINGVO, religio, politika aŭ alia opinio (Artikolo 2, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj). Kiam homoj ekkonstruis la Turon de Babelo, ĉiuj komprenis unu la alian, sed ilia aroganteco estis punita kaj nun ili ne povas interkomunikadi pro malsamaj esprimlingvoj, kvankam en la profunda angulo de siaj koroj ili havas samajn sentojn. Pro tio, por liberigi homojn el tiu situacio, ni bezonas komunan lingvon. Eble ni povas diri ke nia klopodo havi komunan lingvon estas nia esprimo de pardonpeto al Dio. UN festos la 50-an jubileon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj venontjare. Kvankam la Artikolo 2 de la Deklaracio diras ke "la Deklaracio validas same por ĉiuj homoj sen kia ajn diferencigo, inkluzive lingvon", UN ankoraŭ ne defendis lingvajn rajtojn de lingve malfortaj nacioj. Pro tio, UEA proponis al la UN Alta Komisiono de Homaj Rajtoj ke ni

okazigu internacian simpozion, "Lingvaj dimensioj de homaj rajtoj", venontjare en UN Oficejo en Ĝenevo, sub la oficiala aŭspicio de UN. Mi sincere esperas ke UN akceptos nian proponon.

La Papo diris en sia parolado al UN Ĝenerala Asembleo en Oktobro 1995, okaze de la UN 50-a jubileo, ke "Malfeliĉe la mondo ankoraŭ devas lerni kiel vivi kun diverseco, kaj emfazis la valoron de diverseco por unuigi homan familion. Homoj povas vivi harmonie kun diverseco, se ili rekonas kaj akceptas la diversecon. La komuna lingvo kontribuas por atingi al unueco en diverseco."

LEE Chong-Young

La diversajn opiniojn de esperantistoj publikigis pollingve la Katolika Inform-Agentejo en Varsovio kaj diskonigis tra la tuta lando. La Agentejo aperigis ankaŭ en siaj informmaterialoj la intervjuon, kiun la E-Redakcio de Pola Radio faris - lige kun la vizito de la papo - kun episkopo Wladyslaw Miziolek, unu el la plej grandaj subtenantoj de la utiligo de E-o por ekleziaj celoj. Tiamaniere la E-Redakcio, kiu iniciatis la enketadon kaj kunlaboron kun la Katolika Inform-Agentejo, enplektis en la vaste observatan viziton de Johano Paŭlo la II-a, la demandon de la utiligo de E-o por religiaj celoj.

Emociplena dankŝildo de la alzacaj poloj, kiu reprezentas la fama Virgolino de Czestockowa (ligno-1952)



EN NIA ASOCIO

La Raporto de la kongreso en La Houssaye en Brie aperos en la venonta bulteno.

Post peto de la IKUE-sekcio de Ĉehio, nia asocio pere de Sino Vincent, tradukis de esperanto al franca lingvo flugfolion pri prezento de katolikaj esperantistoj "Les catholiques espérantistes se présentent à vous". Tiu folio post enkomputiligo de la redaktoro estis senpage multobligita de la "Katolika Itala Misio de Mulhouse" en 1000 ekzempleroj kaj sendita al GRAZ por disdonado al partoprenantoj de la EKUMENA EUROPA RENKONTIĜO.

Simile faris la IKUE-Sekcio de Ĉehio, Germanio kaj Italio.

Baldaŭ aperos en esperanto libreto pri la vivo de Jeanne Jugan fondinto de la "Petites Soeur des Pauvres"

Tio estis post anonco en nia bulteno (Nro 191), al kiu respondis S-ro PETIT, sendante manuskripton de 50 paĝoj en esperanto pri tio. En letero de la 23.06.97, la Kongregacio dankis nin pri tiu projekto kaj petis tri specimenojn de la eldonota libreto en esperanto.

Por Espero Katolika 1-a listo 1997:

- 01/ S-ro COLLEU Marcel 02/ S-ro SAUTREUIL Bernard
- 03/ S-ro BINCHE Marc 04/ S-ro LEVAL Paul
- 05/ S-ro MILLET Jean 06/ S-ro FARDET Robert
- 07/ S-ro TOURTOIS 08/ S-ro PONS Roger
- 09/ S-ro AMOUROUX Jean 10/ S-ro VERNIN
- 11/ S-ro VERNIN Paul 12/ S-ro GOURDON Armand
- 13/ S-ro MARTIN Louis 14/ S-ro LANDRIN Daniel
- 15/ S-ro ROYER Pierre 16/ F-ino RIMASSON Jeannine

- 17/ F-ino HERVIER Jocelyne 18/ S-ro PETIT Yves
 19/ S-ro THIOILLIERE Eloi 20/ S-ro BASSO Michel
 21/ F-ino GOUDE Madeleine 22/ S-ro DOYELLE Jacques
 23/ S-ro BESSIERE Albert

UTILAJ INFORMOJ

Esperanto en diocezo per reto.

En la nova katedralo de la "Releviĝo", en Evry (Essone), eblas havi per Internet du paĝojn en esperanto pri la prezentado de la tiea diocezo.

Jen la dioceza adreso sur Internet:

<http://www.cef.fr/evry> (vidu en menuo diocèse)

Por havi pli da informoj kaj/aŭ precizigoj, vi povas kontakti - franclingve- Bernard LECOMPTE 4, Av. Fragonard 91000 EVRY, kaj lin gratuli pro tiu iniciato.

Estus ankaŭ tre bone viziti tiun katedralon kaj peti surloke tiujn esperanto-paĝojn.

(J.V)

CD-Roma Biblia teksto:

Sendiskute la Biblio kalkuliĝas inter la grandaj monumentoj de la monda literaturo, kvankam pro multaj milionoj ĝi gravas unualoke pro sia religia signifo kiel baza dokumento, en sia unua parto, de la juda religio, kaj, en sia tuto, de kristanismo en ties diversaj formoj. Zamenhof jam en la Unua Libro (1887) enmetis du tradukojn el la Biblio. Poste li tradukis, rekte el la hebrea Masora teksto, la tutan unuan parton, kiun oni nomas inter ne-judoj la Malnovan Testamenton. Nur post lia morto ĝi aperis, en 1926, kune kun la Nova Testamento en Londono, fare de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo kaj la Nacia Biblia Societo de Skotlando. Ofte

okazis represoĝ de tiu eldono, tiel ke neniu alia libro en esperanto escepte de lernolibroj atingis similan eldonkvanton

Sed la CD-ROM estos unua. Do nun oni povas plenrajte aserti, ke la tuta Biblio ekzistas en Esperanto.

Jen la teknikaj detaloj pri la diskedo: Temas pri Multimedia-CD-ROM laŭ ISO-normo 9660 kun 364 MB. Por vidigi aŭ aŭdigi la enhavon, necesas komputilo IBM-kongrua ekde 486DX66, labor-storo 4 MB, libera spaco sur la durdisko 12 MB, son-karto kongrua kun Soundblaster, VGA-grafika karto 256 koloroj. La prezo estos eksterordinara malalta. Oni informos Vin tuj kiam eble.

(El Dia Regno Nro 789)

Miljara Jubileo de Sankta-Adalberto 997-1997

Apostolo de la Orienta Kristanaro. (kanto el "DIO BENU" informilo de la ĉeĥa-İKUE sekcio.)

KANTO AL LA HONORO DE SANKTA ADALBERTO

Muziko: Sac. Ferdinand Hrušat 1997 Traduko: Josef Cink 1997 Vortoj: B. M. Kudla 1880

Tre serioze

1. Sank-ta A-dai-ber-to, kun res-pek-to ni - a land' vin pe-tas pri pro-tek-to,

es-tas ni - a fort' vi kaj ho-no-ro, nin ĝo-ji-gas ĉi-am vi - a glo-ro.



1. Sankta Adalberto, kun respekto / nia land' vin petas pri protekto, / estas nia fort' vi kaj honoro, / nin ĝojigas ĉiam via gloro.
2. Vi al Dio donis vian vivon, / al popol' dediĉis vi aktivon, / portis vi al ĉiuj Dian gracon, / ne permesis al vi ian lacon.
3. Ĉeĥa patrolando vin estimas, / pri protekt' al vi Polland' pilgrimas, / Slovaki' kaj Hungari' el vortoj / de vi prezentitaj ĉerpas fortojn.
4. Petas ni de vi ĉe Di' subtenon, / ke Li donu al ni sian benon, / ke la peko-tenton ni ne aŭdu / kaj vin en la pac' ni ĉiam laŭdu.

KALENDARO

1997

23/06 GRAZ (Austio)

ĝis 2a Eŭropa Ekumena Kunveno

29/06 (Organizas Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI

19/07 SEBRANICE (Ĉeĥio) apud Litomyšl

ĝis 17-a IKUE E-Tendaro Prezo : 400 FF

02/08 Oni dormas en 2-litaj bonkvalitaj tendoj.

Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara kapeleto .

Por la tuta dusemajna restado pagos gejunuloj nur 350 FF (inkl.manĝoj), (410 FF por plenkreskuloj)

18/08 PARIZO

ĝis 12a. MONDAJ JUNULARAJ TAGOJ

24/08


31/08 ROMO-RIMINI (Italio)

ĝis 50-a jubilea IKUE-Kongreso

08/09 Temo: "Iru do kaj faru ĉiujn popolojn de la mondo disĉiploj".

Merkrede 3.9 Aŭdienco ĉe Papo .

(Vidu programon kaj aliĝilon p.19)

1998 Augusto : UNIVERSALA KONGRESO
en MONTPELLIER

Jen la emblemo de la 50a IKUE-Kongreso, realigita de d-ro Mario Guilla, grafikisto, kunlaboranto de la revuo de la itala IKUE-sekcio. Ĝi kunmetas la Bazilikon de Sankta Petro (kies kolonaro etendiĝas kvazaŭ ĉirkaŭbrake) kaj la stilizitan bildon de la Arko de Aŭgusto en Rimini.

50a IKUE-KONGRESO ROMO-RIMINI 31/8 - 7/09/97

Kun la alta patroneco de la
Itala Respublika Prezidanto.

Adreso: Centra Oficejo de IKUE
Via di Porta Fabbrica, 15
I-00165 ROMA RM
Tel/Fax : (06)63.28.39

Programo:

31/08 : Alveno, 19.00 Sankta Meso - Interkona vespero

01/09 : Eble Diservo en Sankta Petro- Inaŭguro

Audienco ĉe la Itala Respublika Prezidanto,

Lia Ekscelenco Oscar Luigi Scalfaro.

Vizito de basiliko- vespere Rozario en S.Petro

02/09 S.Meso - Prelego - Vizito de la urbo.

03/09 Audienco ĉe la Papo - Foriro al Rimini.

04/09 Libera mateno, ekumena diservo

Krozado en maro.

05/09 Ĝenerala asembleo de IKUE

Vizito de la ŝtato: San Marino

Vespere: greko-katolika diservo

06/09 Libera mateno por vizito, muzika vespero

07/09 Diservo, Fermo de la kongreso.

Kongreskotizoj : ĝis 30.04.1997 180 FF poste 250 FF
(junuloj: <30 jara) rabato 50%

Prezaro por la restado dum la tuta kongreso en ROMO kaj RIMINI

En ROMO de la 31.08 vespere ĝis la 3a de septembro tagmeze, kun 2 manĝoj tage: matenmanĝo kaj vespermanĝo-inkl. de trinkaĵoj.

En RIMINI de la 3a. de sept. vespere ĝis la 7a de septembro tagmeze, kun 3 manĝoj -sen trinkaĵoj.

-en 2-lita aŭ 3-lita ĉambro kun necesejo : 900 FF

-en 1-lita ĉambro kun necesejo 1400 FF

Aliĝiloj kaj kostoj por partatempa restado: bonvolu peti la detalojn de: IKUE en Romo aŭ al la redaktoro)

Rim: Ĝis la 15.an de majo , jam aliĝis 250 personoj el 12 landoj. (15 francoj)

Ni funebras kaj kondolencas .

Forlasis nin ĉi tiu nia frato :

- **Morgan ROBIOLLE (14-jara)**
nepo de niaj membroj g-roj Robiolle
el LA HAIE DE PUITTS (50)

- **F-ino STUTZMANN Antoinette**
membro el BUHL (68)



Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj geamikoj kaj gefratoj en Kristo.

ANEKDOTOJ

Grupo vizitas Katakombon . La gvidisto abunde parolas pri la martiroj. Ĉe la fino de la vizito - kiel kutimas, li demandas ĉu iu bezonus plian informon .

“ Jes, aldiras virino. Ĉio pri kio vi bele ĵus parolis, okazis ĉu antaŭ aŭ ĉu post Jesuon ?

(Ghislaine ZARCA - Nice)

ANONCOJ

06/ Ĉu iu ŝatus registri tiun gazeton per magnetofona kasedo por ke blinduloj povu aŭskulti ? (Philippe)

07/ Haveblas jam kandeloj kun esperantaj surskriboj .

Post sia pensiigo s-ro Tuinder trovis tre interesan laboron kiel volontulo en metia kandelfarejo, ligita kun mondfama abatejo benediktana. Ankaŭ vi povas mendi kandelon okaze de Pasko aŭ Pentekosto, naskiĝo, bapto aŭ geedziĝo !

Ĉiun kandelon oni pentros aŭ ornamos laŭ via gusto kaj conforme al ĉiuj deziroj viaj.

Estas jam haveblaj kandeloj kun la surskriboj :
”Esperanto, Lingvo Universala, Fariĝu Lumo, “.

Skribu en Esperanto al :

Abatejo S-ta Adelberto, Abdijlaan 26,
NL -1935 BH EGMOND-BINNE .

Nederlando

(el la gazeto de niaj protestantaj fratoj “DIA REGNO “01/1997)

08 : Grupo de germanaj esperantistoj projektas traduki regule la dumonatan bulteneton "Lettre de Taizé" en esperanton .Por tio ili serĉas bonvolemulojn por traduki ses foje jare kelkajn paĝojn aŭ parte de tiu bulteneto de franca lingvo al esperanto. Poste ĝi estos reviziita de germana skipo.

(Tio estus bona ekzerco por plibonigi vian praktikon de la internacia lingvo !)

Interesuloj bonvolu skribi al :

Reinhard Pfluger

Hermannstr. 3

D-60318 FRANKFURT

09 : " ..Kiel ĉiuj scias, la lasta Internacia Kongreso en Francio okazis en Marseille dum somero 1957. Do , venontjare,estus bone se ni povus proponi al niaj eksterlandaj gesamideanoj memorindan kongreson. Organizati Tutmondan Kongreson estas grava afero. Pro tio, la montpelieraj gesamideanoj bezonus multe da gebonvolemuloj por helpi dum la Kongresa Semajno-certe- sed ankaŭ antaŭe kaj poste.

Se vi intencas partopreni de la 1a ĝis la 8.a de aŭgusto 98 kaj bonvolas helpi ,

Se vi povus libertempi unu semajnon antaŭe aŭ poste (aŭ la du),

bonvolu vin proponi

al : Doktorino Yvette VIERNE
5,Rue du Docteur ROUX
34090 MONTPELLIER.

Bonajn feriojn !

1) *Preni tempon por rikolti*

Rikolti la ĝojon de la ferioj,
la ĝojojn de la somero, la sunon,
la naturon, la maron, la montaron.
Momento da kvieteco,
ripoziga tago ...treniĝi, ... spiri !
Ĝui promenadon, miri sun-subiron.
Estas miloj da floroj por rikolti .

3) *Preni tempon por mediti.*

Post monatoj da trepida vivo,
puŝita, disigita, ...serĉi kien oni iras,
de pli fore juĝi, iom da silento,
bona libro, momento da pripenso,
preĝi...sole kaj kun aliaj.
Retroviĝi... retrovi aliajn kristanojn...
renkonti DION, ĉiam preta por akcepti nin,
se ni scias preĝi .

2) *Preni tempon por akcepti.*

Finfine trankvileco !
Rigardi ĉirkaŭ si ...pli bone
kompreni la alian...sian edzon,
eble siajn infanojn !
Amikoj, kiujn oni invitas,
familio, kiun oni akceptas,...
aŭskulti,...diskuti,...
esti disponebla, renkonti
malsamajn personojn.
Estas miloj da personoj por
akcepti.

Kotiztabelo 1997

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F

Peranto : S-ro M. COLLEU

95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES

P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE .

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : 60 F

geedza paro : 80 F

infano ĝis 16-jara, pastro, religiu(in)o : 30 F

bonfaranto : 200 F

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 2ème trimestre 1997

C.P.P.A.P : N° 62532

Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM

Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris

sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996

Directeur : Albert BESSIERE

Directeur délégué: Michel BASSO